

Jedeta

霍小玉传

Jiang Fang (c. 780-830)

Guozhu tradukis

(世汉对照)

e-Librigita de Elerno

sept. 2008



Rimportreto pri Jadeta

**Jadeta — sen favor' de sorto
mankis al ŝi feliĉ' serena.
Princa filino nobldevena
iĝis hetajro sub distordo.**

**Rapide venis rev-aborto.
Malsane kuŝis ŝi ĉagrena.
Jadeta — sen favor' de sorto
mankis al ŝi feliĉ' serena.**

**Bravul' venigis lin per forto,
okazis kiel song' omena.
Aperis jen kulmino scena—
ŝia akuzo antaŭ morto.**

Jadeta — sen favor' de sorto.

可叹小玉，命运悲戚。王府千金，沦为艺伎。
幻想破灭，卧病不起。可叹小玉，命运悲戚。
黄衫客来，有如梦里。临终控诉，血泪交涕。
可叹小玉，命运悲戚。

Jadeta

Jiang Fang (ĉ.780-830)

Dum Dali-erao (766-779), Tang-dinastio, vivis juna instruitulo Li Yi de Long'xi. En sia 20-jaraĝo li jam trapasis la metropolan ekzamenon por la titolo de Jinshi (ĝjinŝi-o), kaj, la sekvantan jaron, por partopreni laŭ devigo en la ankoraŭfoja ekzameno por selekti ŝtatoficistojn far la Ministerio de Civilaj Aferoj, li venis somere al la metropolo Chang'an en la sesa monato kaj loĝis en Xinchang-kvartalo.

Li devenis el nobela familio, montriĝis jam en juneco senkompare elstara en beletroverkado, admirate eĉ de veteranoj en literatura rondo. Kun memkontento pri sia talento, li tre deziris havi bonan edzinon, kaj longe serĉis inter famaj virinoj de la ĉefurbo, sed vane.

En Chang'an vivis svatistino Bao, kiu estis la dekunua inter siaj gefratoj kaj hejma putino en la domo de imperiestra bofilo Xue, sed jam elaĉetita kaj edzinigita antaŭ pli ol dek jaroj. Sperta en observado, kun lerta lango, Bao konis preskaŭ ĉiujn gravajn familiojn en la metropolo, kaj, koncerne al informiteco pri amaĵoj kaj konsilado pri amorado, vere okupis la unuan lokon. Akceptinte abundajn donacojn de Li Yi, ŝi ĉiel penadis por plenumi lian sinceran peton.

Post monatoj, en iu posttagmezo, kiam Li Yi sidis en la suda kiosko de sia loĝejo, subite aŭdiĝis urĝa frapado sur la pordo — jen alvenis Bao. Supren tirante sian baskon, Li Yi kuris rentonti al ŝi.

“Ho, kio favora venigis vin ĉi tien ? Bao-njo !” demandis Li Yi.

Bao ekridis kaj respondis: “Ĉu vi havis dolĉan sonĝon ? Nun avataris el ĉielo feino, kiu avidas nenian riĉaĵon, sed nur admiras talentan galantulon; unuvorte, ŝi estas kreita por vi !”

Aŭdinte tion, Li Yi eksaltis de ĝojo kaj sentis sin kvazaŭ ŝvebanta en aero. Tenante manon de Bao, li salutis kun danko kaj diris: “Mi volonte estu via sklavo dum tuta vivo ! Sed kie la feino loĝas kaj kia estas ŝia nomo ?”

Bao respondis: “Ŝi estis la plej juna filino de Princo Huo kaj nomiĝas Jadeta. La princo tre dorlotis ŝin. Ŝia patrino, Jinchi, estis lia favorata servistino. Kiam la Princo mortis, liaj filoj rifuzis agnoski ŝin kiel fratinnon pro la servistineco de ŝia patrino. Do, ili donis al ŝi porcion da riĉaĵo kaj forsendis ŝin kaj ŝian patrinnon aliloken. La patrino ŝanĝis ŝian familian nomon al Zheng, kaj neniu sciis plu, ke ŝi estas filino de la Princo. Mi neniam vidis, ke iu pli belas ol ŝi, senkompare gracia kaj altemperamenta. Cetere ŝi lertas en ĉio, precipe en muziko, versado kaj kaligrafado. Hieraŭ ŝia patrino petis, ke mi trovu por ŝi bonan junulon, indan je Jadeta. Mi detale rakontis pri vi. Fakte ili scias vian nomon. Ŝia patrino tre ĝojas pri mia svato. Ili loĝas en la unua kortodomo, malaltporda, de la strateto Malnova Templo, Shengye-kvartalo. Mi jam fiksas la rendevuan daton. Iru morgaŭ tagmeze! Vi trafos, ĉar ekstere de la strateto vin atendas servistino nomata Guizi.”

大历中，陇西李生名益，年二十，以进士擢第。其明年，拔萃，俟试于天官。夏六月，至长安，舍于新昌里。

生门族清华，少有才思，丽词嘉句，时谓无双，先达丈人，翕然推伏。每自矜风调，思得佳偶，博求名妓，久而未谐。

长安有媒鲍十一娘者，故薛驸马家青衣也，折券徙良，十余年矣。性便僻，巧言语，豪家戚里，无不经过，追风挟策，推为渠帅。常受生诚托厚赂，意颇德之。

经数月，李方闲居舍之南亭，申未间，忽闻扣门甚急，云是鲍十一娘至。摄衣徙之，迎问曰：“鲍卿，今日何故忽然而来？”

鲍笑曰：“苏姑子作好梦也未？有一仙人，谪在下界，不邀财货，但慕风流。如此色目，共十郎相当矣。”

生闻之惊跃，神飞体轻，引鲍手且拜且谢曰：“一生作奴，死亦不惮。”因问其名居，

鲍具说曰：“故霍王小女字小玉，王甚爱之。母曰净持，净持即王之宠婢也。王之初薨，诸弟兄以其出自贱庶，不甚收录，因分与资财，遣居于外。易姓为郑氏，人亦不知其王女。资质穠艳，一生未见。高情逸态，事事过人，音乐诗书，无不通解。昨遣某求一好儿郎，格调相称者。某具说十郎，他亦知有李十郎名字，非常欢惬。住在胜业坊古寺曲，甫上车门宅是也。已与他作期约，明日午时，但至曲头觅桂子，即得矣。”

Post foriro de Bao, Li Yi komencis prepari sin por la grava okazo. Li sendis sian serviston Qiuhong al sia kuzo Li Shang, generala adjutanto en la ĉefurbo, por pruntpreni nigran ĉevalon kun ora brido. Vespere li sin banis kaj aranĝadis, kaj pro ĝojo ne povis endormiĝi la tutan nokton.

Frumatene de la sekvanta tago, li surmetis kaptukon kaj ekzamenis sin foj-refoje antaŭ spegulo, ĉiam timante ke ankoraŭ io ne estus en ordo. La tempo do tiel pasis dum lia sinpreparo kaj fine estis tagmeze. Li Yi haste venigis la ĉevalon kaj rekte galopis al Shengye-kvartalo.

Apenaŭ atinginte la lokon, Li Yi vidis, ke tie efektive staras knabino. Ŝi demandis: “Ĉu vi estas s-ro Li la Deko?”

Li jesis kaj descendis de la ĉevalo. Petinte ke li konduku ĝin en la domon, ŝi rapide ŝlosis la pordon.

Bao aperis el la dominterno, ride dirante: “Ha, de kie entrudiĝas tiel impertinenta knabego?”

Li Yi reciprokis al ŝi ankaŭ per ŝerco, enkondukite tra la meza pordo.

En la korto kreskis kvar cerizujoj kaj sur tiu ĉe la nordokcidenta angulo pendis kaĝo kun papago. Vidinte fremdulon la papago kriis: “Venas homo! Tuj mallevu kurtenon!”

Ĉar nature Li Yi estis ne societema, ankoraŭ kun skrupulo kaj hezito en sia koro, tial nun, ekaŭdinte la krion de la papago, li timigite haltis kun maltrankvilo kaj ne kuraĝis antaŭen iri.

Akompanate de Bao, la patrinon de Jadeta descendis de la perono por lin

bonvenigi. Kaj li sekvis ilin internen kaj sidiĝis kontraŭ la mastrino kiu, iom pli-ol-40-jara, aspektis ankoraŭ sufiĉe ĉarma, kun gracia konduto.

“Jam antaŭ longe ni aŭdis pri viaj talento kaj eruditeco,” ŝi diris al Li Yi. “Nun mi vidas, ke vi estas kaj eleganta kaj bela. La famo ne trompas. Mi havas filinon, ne bone instruitan, tamen ne malbelan, eble indan je vi. Sinjorino Bao la Dekunua jam plurfoje proponis vin. Mi do konsentas edzinigi la filinon al vi.”

Li ŝin dankis. “Se mi, ŝtipa kaj banala, povos esti akceptita, mi sentos grandan honoron dum mia tuta vivo !” La mastrino ordonis aranĝi festenon kaj voki Jadetan el la orienta ĉambro. Kiam Jadeta envenis, Li Yi leviĝis kaj riverencis al ŝi, sentante la ĉambrojn pleniĝi de jadaj briloj. kaj lin tute ensorĉis ŝia klara rigardo.

La knabino sidiĝis ĉe sia patrino, kiu diris al ŝi: “Vi ŝatas ripeti tiujn versojn:

Kurteno ŝoviĝas en vento ekblova,
Ĉu venas ĉifoje amiko malnova?

Jen la verkinto. Vi legadis kun sopiro liajn poemojn. Kiel nun laŭ vi?”

Jadeta klinis sian kapon, kaj mallaŭte respondis kun rideto: “Mi prefere restu en la sopirado! Ĉu poeto povus esti sen bela aspekto?”

Li Yi stariĝis kaj faris plurajn riverencojn, dirante: “Vi amas talenton kaj mi admiras belecon, nireciproke konformas unu al la alia!”

Jadeta kaj ŝia patrino interŝanĝis rigardon kun rideto.

Post kiam ili kundrinkis kelkajn tasojn da vino, Li Yi restariĝis kaj petis Jadetan kanti. Komence ŝi ne konsentis, sed ŝia patrino insistis. Fine ŝi kantis per klara voĉo delikatan melodion.

鲍既去，生便备行计。遂令家僮秋鸿，于從兄京兆参军尚公处，假青骊驹，黄金勒。其夕，生浣衣沐浴，修饰容仪，喜跃交并，通夕不寐。

迟明，巾帻，引镜自照，惟惧不谐也。徘徊之间，至于亭午。遂命驾疾驱，直抵胜业。

至约之所，果见青衣立候，迎问曰：“莫是李十郎否？”

即下马，令牵入屋底，急急锁门。

见鲍果從内出来，遥笑曰：“何等儿郎造次入此？”生调诮未毕，引入中门。

庭间有四樱桃树，西北悬一鹦鹉笼，见生入来，即语曰：“有人入来，急下帘者。”生本性雅淡，心犹疑惧，忽见鸟语，愕然不敢进。逡巡，鲍引净持下阶相迎，延入对坐。年可四十余，绰约多姿，谈笑甚媚。

因谓生曰：“素闻十郎才调风流，今又见容仪雅秀，名下固无虚士。某有一女子，虽拙教训，颜色不至丑陋，得配君子，颇为相宜。频见鲍十一娘说意旨，今亦便令永奉箕帚。”

生谢曰：“鄙拙庸愚，不意顾盼，倘垂采录，生死为荣。”

遂命酒馔，即令小玉自堂东阁子中而出，生即拜迎。但觉一室之中，若琼林玉树，互相照耀，转盼精彩射人。

既而遂坐母侧，母谓曰：“汝尝爱念‘开帘风动竹，疑是故人来，’即此十郎诗也。尔终日吟想，何如一见？”

玉乃低鬟微笑，细语曰：“见面不如闻名，才子岂能无貌？”

生遂连起拜曰：“小娘子爱才，鄙夫重色，两好相映，才貌相兼。”

母女相顾而笑，遂举酒数巡。生起，请玉唱歌，初不肯，母固强之。发声清亮，曲度精奇。

Kiam ili finis la festenon, jam vesperis. Bao kondukis la junulon en la okcidenta korteto, kie la ĉambroj kvietis ŝirmate per pompaj kurtenoj. Bao ordonis, ke servistinoj Guizi kaj Huansha helpu al Li Yi demeti liajn botojn kaj zonon. Post momento aperis Jadeta. Kun ĉarma pudoro ŝi milde sin malvestis. Kaj la litvualo estis mallevita. Ili kuŝiĝis al la komuna kapkuseno kaj ĝuis tiel delicajn intimaĵojn ke Li Yi supozis sin en la lito kun vera feino kiel de Wushan-monto aŭ Luo-rivero.

Noktmeze, tamen, Jadeta fikse rigardis lin tra siaj larmoj kaj diris: “ Kiel humila kantistino, mi bone scias, ke mi ne estas inda parulino por vi. Nun vi amas min pro mia beleco. Sed mi timas, ke via sento ŝanĝiĝos post mia velkiĝo, kaj tiam mi estos simila al liano sen ajna apogilo aŭ ventumilo forlasita en aŭtuno. Tial, dum mia zenita delico mi ne povas regi mian malĝojon.”

Aŭdinte tion, Li Yi estis tre kortuŝita. Li etendis sian brakon sub ŝian nukon kiel kapkusenon kaj diris : “ Nur hodiaŭ mi sukcesis realigi mian sonĝon por la tuta vivo. Mi preferas tujan morton ol disiĝi de vi! Kial vi parolas pri tio ? Bonvole donu blankan silkon, ke mi skribu mian ĵuron sur ĝi !”

Forviŝinte siajn larmojn, Jadeta vokis servistinon Ceriza, ke ŝi levu la kurtenon, tenu kandelon kaj alportu penikon kaj inkfrotujon, kiujn Jadeta kunprenis el la princa palaco ĉar, krom muziko, ŝi ŝatis verki poemojn. Ŝi malfermis broditan sakon kaj eltiris tri futojn da fajna blanka silkajo, nigre liniigitaj, kiujn ŝi transdonis al Li Yi ke li surskribu. Naturdotita per verktalento, Li Yi skribis flue kaj rapide. Kia la ĵuro, ĵuro je montoj kaj riveroj, je la suno kaj luno! Kiaj la vortoj, vortoj sinceraj kaj kortuŝaj. Fininte sian skribon, Li Yi prezentis la silkon al ŝi atentigante, ke ŝi bone ĝin konservu.

Ili feliĉe kunvivis du jarojn kiel paro da ambirdoj kaj ĉiam kunestis dum tagoj kaj noktoj.

Printempe de la tria jaro Li Yi iris al ekzameno. Post brila sukceso li estis nomumita kiel ĉefsekretario de Zheng-gubernio. En la kvara monato de la jaro, kiam printempo ankoraŭ ĉarmis kaj somero ekpompis, antaŭ ol veturi al tiu gubernio por sin anonci kaj al Luoyang por viziti siajn gepatrojn, li aranĝis adiaŭan festenon por ĉiuj parencoj en la metropolo Chang'an. Post foriro de ĉiuj gastoj, la juna paro ekdronis en tristo pro baldaŭa disiĝo.

“Kun talento kaj famo,” flustris Jadeta, “ vi havos amason da admirantoj, kaj multaj sinjoroj volonte donos al vi sian filinon. Aliflanke, al viaj gepatroj ankoraŭ mankas leĝa bofilino, tial, post kiam vi veturos hejmen, ili certe trovos por vi bonan edzinon. La nuna ĵuro kondukos al nenio. Mi havas nur malgrandan deziron. Ĉu vi perme sas ke mi diru ĝin?”

Li Yi surpriziĝis.“ Ĉu mi iel ofendis vin ? Kial vi tiel parolas ? Diru, kaj mi nepre ĝin plenumos!”

“Mi aĝas jam 18 jarojn, dum vi, nur 22, do estas ankoraŭ ok jaroj ĝis la edziga adolteco. Mi volas elĝui dum tiuj ok jaroj ĉiom da amo kaj feliĉo de mia tuta vivo. Post tio vi, certe ne malfrue, povos preni fraŭlinon el bona familio kiel vian

novedzinon. Tiam mi fortondu la hararon kaj kovru min per la nigra robo de monaĥino. Sole tion, jam nenion alian mi asopiras.”

Kortuŝiteco lin larmigis.

“ Mia ĵuro je la brila suno kostas vivon kaj morton! Mi sentas malsufiĉa nian kunvivon eĉ ĝis la oldiĝo. Kiel do mi povas facilanime pensi pri alia afero? Mi kore petas, ke vi ne malfidu min! Trankvile atendu! Mi certe revenos al Huazhou en la oka monato kaj sendos porti vin al mi. Post nelonge ni rekuniĝos.”

Post kelkaj tagoj, Li Yi adiaŭis ŝin kaj veturis orienten.

酒阑及暝，鲍引生就西院憩息。闲庭邃宇，帘幕甚华。鲍令侍儿桂子、浣沙，与生脱靴解带。须臾玉至，言叙温和，辞气宛媚。解罗衣之际，态有余妍，低帙昵枕，极其欢爱，生自以为巫山洛浦不过也。

中宵之夜，玉忽流涕观生曰：“妾本倡家，自知非匹，今以色爱，托其仁贤。但虑一旦色衰，恩移情替，使女萝无托，秋扇见捐。极欢之际，不觉悲至。”

生闻之，不胜感叹，乃引臂替枕，徐谓玉曰：“平生志愿，今日获从。粉骨碎身，誓不相舍。夫人何发此言？请以素缣，著之盟约。”

玉因收泪，命侍儿樱桃，褰幄执烛，授生笔研。玉管弦之暇，雅好诗书，筐箱笔研，皆王家之旧物。遂取绣囊，出越姬乌丝栏素缣三尺以授生。生素多才思，援笔成章，引谕山河，指诚日月，句句恳切，闻之动人。染毕，命藏于宝篋之内。自尔婉妾相得，若翡翠之在云路也。如此二岁，日夜相从。

其后年春，生以书判拔萃登科，授郑县主簿。至四月，将之官，便拜庆于东洛。长安亲戚，多就筵饯。时春物尚余，夏景初丽，酒阑宾散，离恶萦怀。

玉谓生曰：“以君才地名声，人多景慕，愿结婚媾，固亦众矣。况堂有严亲，室无冢妇，君之此去，必就佳姻，盟约之言，徒虚语耳。然妾有短愿，欲辄指陈，永委君心，复能听否？”

生惊怪曰：“有何罪过，忽发此辞，试说所言，必当敬奉。”

玉曰：“妾年始十八，君才二十有二。迨君壮室之秋，犹有八岁。一生欢爱，愿毕此期，然后妙选高门，以谐秦晋，亦未为晚。妾便舍弃人事，剪发披缁，夙昔之愿，于此足矣。”

生且愧且感，不觉涕流，因谓玉曰：“皎日之誓，死生以之。与卿偕小，犹恐未惬素志，岂敢辄有二三？固请不疑，但端居相待。至八月，必当却到华州，寻使奉迎，相见非远。”

更数日，生遂诀别东去。

Dek tagojn post kiam Li Yi venis al sia oficposteno, li petis forpermeson por veturi al Luoyang viziti siajn gepatrojn. Antaŭ ol li revenis hejmen, lia patrino jam anticipis lin fianĝigis al lia kuzino, filino de familio Lu, renoma kaj potenca. Informite pri tio, Li Yi tute ne kuraĝis protesti kontraŭ lia severa kaj obstina patrino. Malgraŭvole li vizitis kun donaco familion Lu kaj kune fiksis nuptan daton en proksima tempo.

La renomaj kaj potencaj familioj ĉiam postulis de fianĉo milionon da moneroj, alie ili ne donos sian filinon. La familio Lu ne estis escepto, sed tiu de Li Yi estis malriĉa. Por havi tiun grandan sumon li devis prunti, do li petis forpermeson por viziti al malproksimaj amikoj. Li veturadis ĉien, tra la baseno de Huai- kaj

Jangzi-riveroj, de aŭtuno ĝis la sekvjara somero. Konsciante ke li jam rompis sian ĵuritan promeson al Jadeta kaj tro prokrastis je la difinita revena tempo, Li Yi sendis nenian informon al Jadeta por senigi al ŝi esperon. Li ankaŭ petis siajn amikojn lasi al ŝi nenian veran informon.

Depost kiam Li Yi ne revenis je la promesita tempo, Jadeta ĉiel klopodis por informiĝi pri li, tamen ŝi ricevis malsamajn, ofte eĉ kontraŭdirajn informojn. Ŝi ankaŭ konsultis multajn sortdivenistojn kaj aŭguristojn, sed vane. Ŝi tiel trenis pli ol unu jaron, en ĉagreno kaj maltrankvilo; fine ŝi malsaniĝis de grava turmento de malĝojo kaj marasme kuŝis en soleca lito. Tamen sen informo de Li Yi tute ne ŝanceliĝis ŝia amsopiro al li. Ŝi ankoraŭ de tempo al tempo donis monon al parencoj kaj amikoj por akiri de ili informojn pri Li Yi. Ŝia klopodado estis tiel persista, ke ŝia mono rapide elĉerpiĝis kaj ŝi ofte sendis sekrete siajn vestojn kaj kuriozaĵojn al la lombardejo de Hou Jing'xian en la Okcidenta Bazaro.

Iutage, servistino Huansha hastis kun ametista harpinglo al la lombardejo kaj renkontis maljunan jadiston, kiu iam laboris por kortego. Ekvidinte la harpinglon, li alparolis ŝin:

“Ho, ĉi tiu harpinglo estas farita de mi mem !” li diris, “Antaŭ kelkaj jaroj, por hartuberiha ceremonio de la plej juna filino, Princo Huo ordonis min fari harpinglon kaj rekompencis min per dek mil moneroj. Mi ĉiam me moras tion. Sed kiu vi estas ? Kie vi akiris ĝin ?”

“Mia mastrino estas ĝuste la plej juna filino de Princo Huo !” respondis la servistino. “Post dekadenco de sia bonstato, ŝi edziniĝis al viro, sed li veturis al Luoyang kaj forlasis sin kun neniuj informoj. Poste ŝi malsaniĝis de melankolio kaj tiel suferis jam du jarojn. Nun ŝi sendis min vendi la harpinglon por gajni per la mono informojn pri sia edzo.”

Aŭdinte tion, la maljuna jadisto kortuŝite larmis. “Ho ve! Ĉu posteulo de nobelo tamen falis en tiel mizeran staton ? Miaj tagoj en kadukeco jam estas ne multaj, sed la historio pri la principino tiel misfortuna vere doloras mian koron !”

Kaj la maljuna jadisto kondukis la knabinon al la domo de Princino Yanguang. Aŭdinte la rakonton pri Jadeta, ankaŭ la principino malgoje suspiris dum longa momento, kaj fine donis al la servistino 120 milojn da moneroj por la harpinglo.

到任旬日，求假往东都覲亲。未至家日，太夫人已与商量表妹卢氏，言约已定。太夫人素严毅，生逡巡不敢辞让，遂就礼谢，便有近期。

卢亦甲族也，嫁女于他门，聘财必以百万为约，不满此数，义在不行。生家素贫，事须求贷，便托假故，远投亲知，涉历江淮，自秋及夏。生自以孤负盟约，大愆回期，寂不知闻，欲断其望。遥托亲故，不遣漏言。

玉自生逾期，数访音信。虚词诡说，日日不同。博求师巫，遍询卜筮。怀忧抱恨，周岁有余，羸卧空闺，遂成沈疾。虽生之书题竟绝，而玉之想望不移。赂遗亲知，使通消息，寻求既切，资用屡空。往往私令侍婢潜卖篋中服玩之物，多托于西市寄附铺侯景先家货卖。

曾令侍婢浣沙，将紫玉钗一只，诣景先家货之。路逢内作小玉工，见浣沙所执，前来认之曰：“此钗吾所作也。昔岁霍王小女，将欲上鬻，令我作此，酬我万钱，我尝不忘。汝是何人？從何而得？”

浣沙曰：“我小娘子即霍王女也。家事破散，失身于人，夫婿昨向东都，更无消息。悒悒成疾，今欲二年。令我卖此，赂遗于人，使求音信。”
玉工凄然下泣曰：“贵人男女，失机落节，一至于此。我残年向尽，见此盛衰，不胜伤感。”
遂引至延先公主宅，具言前事。公主亦为之悲叹良久，给钱十二万焉。

La fianĉino de Li Yi vivis en la metropolo. Plenuminte la fianĉan donacon Li Yi revenis al sia ofico en Zheng-gubernio, sed, je la jarfina monato li refoje petis forpermeson veturi al Chang'an por sia nupto. Li trovis por si kvietan loĝejon, kies adreson li tenis sekreta por ke neniu el liaj konatoj sciu pri ĝi.

Tamen tio ne helpis pro lia bonkora kuzo Cui Yunming kiu, jam trapasinta la ekzamenon pri klasikaĵoj, ofte dum horoj el la pasintaj tagoj gaje drinkis kaj intime babilis kun Li Yi kaj Jadeta en ŝia buduaro. Ĉiufoje, ricevinte novaĵon pri Li Yi, li sincere sciigis al Jadeta kun dankemo, ke ŝi ofte helpis lin per mono aŭ vestaĵoj. Kiam Li Yi venis al la metropolo, Cui rakontis al Jadeta la veron.

“Ho, kial li agis perfide ?” Ŝi suspiris indigne. Pos te, ŝi petis multajn amikojn ke ili persvade venigu Li Yi al ŝi. Tamen li neniel volis iri al ŝi pro tio ke, unuflanke, li hontis pro sia rompo de la promeso kaj, aliflanke, ŝi grave malsanis. Li eĉ intence foriris de sia hejmo en frua mateno kaj revenis nur en malfrua horo por eviti vizitantojn. Vane ŝi ploradis tagnokte, povante nek manĝi nek dormi pro la aspiro foje lin revidi. , Bruligite de indigno kaj malĝojo, ŝi agoniadis en la lito. Ĉio ĉi iom post iom cirkulis en la metropolo, kaj kleruloj simpatie kortuŝiĝis de ŝia amo, dum bravuloj tre indignis kontraŭ li pro lia perfidemo.

Estis la tria monato lunkalendare, la bona tempo por printempa ekskurso. Iutage, Li Yi vizitis kun kvin aŭ ses amikoj Chongjing-templon por apreci florantajn peoniojn. Ili kune promenis en la okcidenta koridoro kaj improvizis poemojn unu post alia. I.a. iu ĉefurbano nomata Wei Xiaqing, unu el intimaj amikoj de Li Yi, diris al Li Yi: " Pr intempo estas bela sezono kaj floroj prospere disfloras. Tamen via malnova amatino mizere turmentiĝas en soleca buduaro ! Estas vere kruele, ke vi forlasis ŝin! Kiel honesta viro oni ne devas tiel agi. Bonvole bone pripensu tion !"

Tiujn vortojn aŭdis juna bravulo kiu, en flava ĉemizo el ramibasta tolo, aspektis bela kaj vigla, kun pafarko ĉe si. Li paŝis malantaŭ ili, akompanate de huna servo-knabo kun mallonge tondita hararo. Subite li ĵetis saluton al Li Yi kaj diris:

“ Ĉu vi estas sinjoro Li la Deko ? Mia familio devenis de la oriento kaj havis parencecon kun imperiestro. Kvankam mankas al mi talento pri literaturo, tamen mi tre ŝatas kaj respektas literatorojn. Jam delonge mi havis adm iron al vi kaj tre ofte deziris vidi vin. Hodiaŭ mi havas la feliĉ on renkontiĝi kun vi. Mia modesta domo estas ne malproksima for de ĉi tie, kaj mi havas muzikistinojn por vin amuzi. Mi havas ankaŭ ok aŭ naŭ ĉarmajn knabinojn kaj dekkelkajn bonajn ĉevalojn, kiuj ĉiuj povas esti je via dispono. Mi nur esperas ke vi degnos honorigi min per via vizito.”

Aŭdinte tion, la amikoj de Li Yi tre ĝojis, kaj kune spronis sian ĉevalon por sekvi la bravulon, kiu rapide turniĝis de unu strateto en alian kaj baldaŭ venis al Shengye-kvartalo.

Ĉar tie estis tre proksime al la loĝejo de Jadeta, Li Yi, anstataŭ iri plu, murmuris ion pretekste kaj volis sin returni.

Sed la bravulo diris:“ Mia modesta domo estas ĝuste ĉi tie. Ĉu vi povus forlasi nin ĉi-momente ?” Kaj li ekkaptis la bridon de la ĉevalo de Li Yi kaj kondukis ĝin antaŭen . Baldaŭ ili atingis la domon de Jadeta. Konsternite Li Yi vipis sian ĉevalon por forrapidi, sed la bravulo tuj ordonis al servistoj ĉirkaŭpreme puŝi la forkuronton enen tra la malalta pordo. Riglinte la pordon, oni kriis :“” Jen sinjoro Li venas !”

Aŭdiĝis bruoj en la tuta domo, pro ĝojo kaj surprizo.

时生所定卢氏女在长安，生既毕于聘财，还归郑县。其年腊月，又请假入城就亲，潜卜静居，不令人知。

有明经崔允明者，生之中表弟也，性甚长厚。昔岁常与生同欢于郑氏之室，杯盘笑语，曾不相间，每得生信，必诚告于玉。玉常以薪菖衣服，资给于崔，崔颇感之。生既至，崔具以诚告玉，玉恨叹曰：“天下岂有是事乎？”遍请亲朋，多方召致，生自以愆期负约，又知玉疾候沈绵，惭耻忍割，终不肯往。晨出暮归，欲以回避。玉日夜涕泣，都忘寝食，期一相见，竟无因由。冤愤益深，委顿床枕。自是长安中稍有知者，风流之士，共感玉之多情；盒±之伦，皆怒生之薄行。

时已三月，人多春游，生与同辈五六人诣崇敬寺玩牡丹花，步于西廊，递吟诗句。有京兆韦夏卿者，生之密友，时亦同行，谓生曰：“风光甚丽，草木荣华。伤哉郑卿，衔冤空室，足下终能弃置，实是忍人。丈夫之心，不宜如此，足下宜为思之。”

叹让之际，忽有一豪士，衣轻黄衫，挟朱弹，丰神隽美，衣服轻华，唯有一剪头胡雏従后，潜行而听之，俄而前揖生曰：

“公非李十郎者乎？某族本山东，姻连外戚，虽乏文藻，心尝乐贤。仰公声华，常思觐止，今日幸会，得睹清扬。某之敝居，去此不远，亦有声乐，足以娱情。妖姬八九人，骏马十数匹，唯公所欲。但愿一过。”

生之侪辈，共聆斯语，更相叹美。因与豪士策马同行，疾转数坊，遂至胜业。生以近郑之所止，意不欲过。便托事故，欲回马首。

豪士曰：“敝居咫尺，忍相弃乎？”乃挽挟其马，牵引而行，迁延之间，已及郑曲。生神情恍惚，鞭马欲回。豪士遽命奴仆数人，抱持而进，疾走推入车门，便令锁却。报云：“李十郎至也。”

一家惊喜，声闻于外。

Okazis tiel: Lastnokte Jadeta havis sonĝon ke bravulo en flava ĉemizo enportis Li Yi ĝis la lito kaj diris, ke ŝi demetu ties ŝuojn. Kaj tio vekis ŝin. Ŝi tuj rakontis la sonĝon al sia patrino kaj mem interpretis :

“Ŝuo — duo. Ĉu tio ne signifas ke la edzo kaj edzino revidu sin? Kaj mi demetu ? Ke min forĵetu? Ho, ve! Mi revidos lastafoje kaj, post tio, okazos mia morto!”

Frumatene, ŝi petis, ke la patrino kombu al ŝi la harojn. Pensante, ke jadeta havas konfuzitan menson pro longtempa malsano, la patrino ne kredis ŝian parolon. Sed post insista petado de Jadeta. ŝi faris al ŝi kombadon. Kaj, tuj post finiĝo de la tualetto, Li Yi efektive estis alvenigita.

Jadeta malsanis tiel longe, ke ŝi ĉiam bezonis helpon en la moviĝo. Sed, aŭdinte la alvenon de Li Yi, ŝi subite leviĝis per si mem, ŝanĝis al si veston kaj iris eksteren,

kvazaŭ helpate de feoj. Ŝi paŝis rekte al Li Yi kaj fiksitis koleran rigardon al li. Morta silento. Ŝi statuis, febla kaj diafana, de tempo al tempo levis sian manikon por kovri la vizaĝon kaj ĵetis rigardon al Li Yi. Dume la ĉeestantoj larmis pri la mizereco de Jadeta.

Mirakle envenis dekoj da pladoj kaj vino. jen aranĝo de la juna bravulo. Ĉiuj ĉetabliĝis.

Jadeta, kvankam ŝi forturnis sin flanken de Li Yi, tenis straban rigardon al li dum longa momento, fine levis sian tason, verŝis la vinon planken kaj diris:

“ Mi estas virino tiom malfeliĉa el virinoj, vi — viro tiel perfida ! Ankoraŭ floraĝa, tamen mi jam devas morti kun rompita koro ! Mi neniam plu povos servi al mia kara panjo ! Mi devas forlasi por eterne miajn silkajn vestojn kaj muzikon ! Mi tristis eĉ en la alia mondo ! ĉion vi kaŭzis ! Sinjoro ! Adiaŭ ! Post la morto mi certe fariĝos venĝa spirito, kiu lasos nenian pacon al viaj edzinoj kaj kromedzinoj ! ”

Kaptante la brakon de Li Yi per sia maldekstra mano, Jadeta ĵetis la tason teren kaj, post kelkaj doloraj plorkrioj, ĉesis spiri.

La patrino levis ŝian kadavron kaj metis ĝin en la sinon de Li Yi, ke li revivigu jadetan per vokado. jam nenio helpas !

Li Yi do surmetis funebran veston kaj ploradis tagnokte, kun forta bedaŭro. En la nokto antaŭ ŝia sepulto, Li Yi ekvidis, ke ŝi reaperis el post la funebra kurteno kaj aspektis tiel bela kiel en ŝia vivo. Ŝi portis granate ruĝan jupon, purpuran tunikon kaj ruĝa-verdan pelerinon. Apogante sin oblikve ĉe la kurteno kaj fingrumante siajn broditajn rubandojn, ŝi diris al li:

“ Dankon pro via adiaŭo atestanta, ke vi ankoraŭ havas iom da amo al mi ! Mi jam povas iom trankvili en Hadeso ! ” Dirinte tion, ŝi subite malaperis.

La sekvantan tagon, ŝi estis sepultita en Yusuyuan antaŭurbe sude de Chang'an. Li Yi ĉeestis ŝian entombigon kaj revenis post plenumo de la funebrado.

先此一夕，玉梦黄衫丈夫抱生来，至席，使玉脱鞋。惊寤而告母，因自解曰：“鞋者谐也，夫妇再合。脱者解也，既合而解，亦当永诀。由此徵之，必遂相见，相见之后，当死矣。”

凌晨，请母妆梳。母以其久病，心意惑乱，不甚信之。龟勉之间。强为妆梳。妆梳才毕，而生果至。

玉沈绵日久，转侧须人，忽闻生来，欻然自起，更衣而出，恍若有神。遂与生相见，含怒凝视，不复有言。羸质娇姿。如不胜致，时复掩袂，返顾李生。感物伤人，坐皆欷歔。

顷之，有酒肴数十盘，自外而来，一座惊视。遽问其故，悉是豪士之所致也。因遂陈设，相就而坐。

玉乃侧身转面，斜视生良久，遂举杯酒酬地曰：“我为女子，薄命如斯；君是丈夫，负心若此。韶颜稚齿，饮恨而终。慈母在堂，不能供养。绮罗弦管，从此永休。微痛黄泉，皆君所致。李君李君，今当永诀，我死之后，必为厉鬼，使君妻妾，终日不安。”乃引左手握生臂，掷杯于地，长恸号哭数声而绝。

母乃举尸置于生怀，令唤之，遂不复苏矣。生为之缟素，旦夕哭泣甚哀。将葬之夕，生忽见玉总帷之中，容貌妍丽，宛若平生。着石榴裙，紫袿盃。裆，红绿帔子，斜身倚帷，手引绣带，顾谓生曰：“愧君相送，尚有余情。幽冥之中，能不

感叹？”言毕，遂不复见。

明日，葬于长安御宿原，生至墓所，尽哀而返。

Post pli ol unu monato, Li Yi geedziĝis kun sia kuzino Lu, sed li restis malserena post tiom da okazintaĵoj. Somere, en la kvina monato, kune kun sia edzino Li Yi revenis al Zheng-gubernio. Nur en la dekunua tago post sia reveno li komencis kunkuŝadon. Nokte li subite aŭdis susurojn ekster la litvualo. Surprizite li rigardis kaj ekvidis ke juna viro, pli-ol-20-jara, milda kaj bela, senĉese mansigne alvokas lian edzinon Lu.

Li Yi tuj leviĝis kaj serĉis rondirante ĉirkaŭ la lito kelkfoje, sed nenium trovis. Tamen la okazintaĵo vekis ĉe li grandan suspekton kaj de tiam li donis al la edzino neniom da paco, ĝis fine dank' al persvadoj far kelkaj amikoj, la geedza interrilato iomete boniĝis. Sed ĉirkaŭ tagdekon pli poste, foje Li Yi de ekstere revenis hejmen kaj vidis, ke lia edzino estis ludanta liuton sur lito. Subite alĵetiĝis en la ĉambron marketrita kesto el rinocera korno, ĉ. unu colon granda kaj amnode ligita per maldika silka rubandeto. La kesto trafis ĝuste la sinon de la edzino.

Malferminte ĝin, Li Yi trovis du abrusajn grajnoj, unu elateron, pecon da afrodiziigaĵo Fashazi kaj iom da amorvekaj ĉarmaĵoj. Vidante tion, Li Yi tuj eksplodis per koleraj hurloj ŝakalaj kaj tigras. Li ekkaptis la liuton kaj per ĝi forte batis la edzinon, devigante ŝin memkonfesi la veron. Tamen ŝi neniel povis klarigi tion por sin pravigi. Poste Li Yi ofte ŝin draŝis kaj turmentis. Fine li denunciis al tribunalo kaj repudiis ŝin.

Post forpelo de la edzino Lu, Li Yi noktadis kun tiu aŭ alia el la favorataj ĉambristinoj kaj servistinoj. Sed ankaŭ ilin li suspektis. Li eĉ murdis iujn pro ĵaluzo.

Foje Li Yi vojaĝis al Yangzhou kaj elaĉetis faman putinon Ying la Dekunuan, kiu estis tre milda, ĉarma kaj multe plaĉis al li. Sed kiam ili kunsidis babili, Li Yi ofte rakontis pri tio, kie li gajnis knabinojn, pri kio ili kulpis kaj kiamaniere li punis ilin per mortigo. Li faradis tian rakonton ĝuste por ke ŝi timu lin kaj ne havu alian amaton. ĉiufoje, antaŭ ol eliri ien, li kovris ŝin en la lito per granda kuvo kaj faris ĉirkaŭsigeladon. Reveninte li ekzamenis ĉion zorgeme kaj fine ellasis ŝin.

Li Yi ĉiam kunportis ponardon, tre akran. Li ofte montris ĝin al siaj servistinoj kaj diris minace:

“Ĝi estas el fajna fero de Gexi, tre taŭga por dehaki kapon de malfidela virino!”

Kiun ajn virinon li prenis, li ĉiam sin tenis tre suspektema. Trifojaj edzo dum siaj trifojaj reedziĝoj senescepte venigis la saman sekvon.

后月余，就礼于卢氏。伤情感物，郁郁不乐。夏五月，与卢氏偕行，归于郑县。至县旬日，生方与卢氏寝，忽帐外叱叱作声，生惊视之，则见一男子，年可二十余，姿状温美，藏身映幔，连招卢氏。

生惶遽走起，绕幔数匝，倏然不见。生自此心怀疑恶，猜忌万端，夫妻之间，无聊生矣。或有亲情，曲相劝喻，生意稍解。后旬日，生复自外归，卢氏方鼓琴于床，忽见自门抛一斑屏钿花合子，方圆一寸余，中有轻绢，作同心结，坠于卢氏怀中。

生开而视之，见相思子二，叩头虫一，发杀鬚一，驴驹媚少许。生当时愤怒叫吼，

声如豺虎，引琴撞击其妻，诘令实告。卢氏亦终不自明。尔后往往暴加捶楚，备诸毒虐，竟讼于公庭而遣之。

卢氏既出，生或侍婢媵妾之属，暂同枕席，便加妒忌，或有因而杀之者。

生尝游广陵，得名姬曰营十一娘者，容态润媚，生甚悦之。每相对坐，尝谓营曰：“我尝于某处得某姬，犯某事，我以某法杀之。”

日日陈说，欲令惧己，以肃清闺门。出则以浴斛覆营于床，周回封署，归必详视，然后乃开。

又畜一短剑，甚利，顾谓侍婢曰：“此信州葛溪铁，唯断作罪过头。”

大凡生所见妇人，辄加猜忌，至于三娶，率皆如初焉。

(fino)